1-a Jaro, N-o 38

APERAS S.A.T. SEMAJNE

18. Junio 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT
23, rue Boyer, Paris XX

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

## El la "libera" Ameriko

La sekvantajn liniojn ni ĉerpas el la Bulteno de Internacia Ruĝa Helpo (junio), kiu donas la plej detalajn kaj precizajn informojn pri la monstra kondamno de niaj esperantistaj kamaradoj. Kiu ne konas la cirkonstancojn en la usona armeo, kiu ne scias, ke ĝuste la usona model-armeo estas *klasa* armeo unua-



Crouch

ranga, kiu edukas siajn anojn ĉiurimede al amo de nacio kaj posedanta klaso, kiu ne legis "Jimmy Higgins" de Upton Sinclair kaj "Tri Soldatoj" de John dos Passos, tiu ne volus kredi, ke estas ebla tia juĝo en la "libera" usona Ameriko. La kruelaj, faktoj malfermos al multaj la okulojn. Junaj vivoj de idealistoj estas ruinigitaj, kaj mokride la reganta socio transiras al la tagordo. Por ni tamen la afero ne estas finita, ne povas esti finita. Kvankam malfortaj, ni devas ĉiam kaj ĉie klopodi kaj penadi, ke la maljustega verdikto estu nuligita. *Red.*

Sur la insulo Hawaii en la Pacifika Oceano, grave fortikigita ŝipara bazo de Usono, la blanka teroro furiozas senbare. Amerikanaj okupaciaj trupoj embrie sufokas ĉian provon de ribelo de la indiĝenaj kaj enmigrintaj laboristoj. Depost unu jaro 12000 laboristoj en la sukerplantejoj strikas. La gvidantoj de l' striko kaj pli ol 20 strikantoj estas arestitaj. Juĝejaj verdiktoj estis faritaj kontraŭ ili. Multaj mortintoj kaj vunditoj fariĝis viktimoj de la provokoj de l' okupaciaj trupoj.

Tiu ĉi insulo momente estas la centro de la grandegaj manovroj de la usona ŝiparo, kiuj en la tuta usona burĝa gazetaro estas traktataj kun entuziasmo. *Honolulu*, la ĉefurbo de Hawaii, estas elkonstruita fortikaĵo kaj formas apogejon de l' usona militarismo sur la vojo al Orienta Azio.

Ankaŭ en la usona laborista gazetaro hodiaŭ la nomo Honolulu staras sur la unua paĝo, sed ne interligite kun la imperialista militludado. La laboristaj gazetoj de Usono okupas sin pri skandala juĝo, kiu estas farita de la milittribunalo en Hawaii kontraŭ du soldatoj de la usona okupacia armeo. La soldatoj Paŭlo Crouch kaj Walter Trumbull estis kondamnitaj je kvardek kaj dudekses jaroj da punlaboro, ĉar ili revolucie estis agintaj en la armeo.

Antaŭ kelkaj monatoj la soldato Paŭlo Crouch, skribisto de la usona armeo en la Sheffield-kazerno sur Hawaii, fondis Esperanto-kurson, kiun partopenis pluraj soldatoj. La anoj de la kurso reprezentis radikalajn opiniojn. Aperis artikolo en la "Honolulua Informilo" pri senatoro, kiu indiĝenojn de la Filipinaj insuloj estis malhelpinta, iri en urbon, en kiu striko estis okazanta, ĉar la senatoro timis, ke la indiĝenoj aliĝus al la striko. La kursanoj indignis pri tiu kazo kiel ekzemplo de la kolonia subpremo kaj respondis al la agmaniero de l' senatoro per letero en la "Informilo".

La kursanoj simpatiis kun la komunismo. Tial ili donis al sia klubo la nomon



Trumbull

"Komunista Ligo de Hawaii" kaj presigis leterfoliojn en la registara presejo de l 27. infanteria regimento. Ili ne sekrete agis rilate al la fondo de l' Komunista Ligo de Hawaii.

La militistaj aŭtoritataj treege maltrankviliĝis pri la malgranda Esperanto-kurso, ĉar ili sendis *spionon* kun la nomo *Eugene M. Fisher,* kiu devus akiri la konfidon de la membroj kaj partopreni la kurson.

En unu kunveno, kiun ĉeestis *Fisher*, estis skribita letero al la Komunista Internacio, en kiu ili tutplene aprobis la vidpunkton de la Internacio. Sekvantan tagon, la 19. februaro, ili estis arestitaj — la tuta klubo, kompreneble escepte de Fisher. Tuj estis preparataj aranĝoj por ilia baldaŭa kondamno.

Kvar el la soldatoj estis akuzataj. La akuzo unue apogis sin sur leĝo, kiu deklaras, ke sekreta societo estas tia, kia ne estas konfirmita de la ĝenerala guvernoro. Plue ili estis kulpigataj, esti malobeintaj la paragrafojn 96 kaj 62 de la armea punkodo, kiu rilatas al "malbona konduto" ktp. kaj traktas krimojn kiel "malatento de deĵoraj instrukcioj" ktp.

La ĉefa ŝarĝanta atestanto estis la spiono *Fisher*. Li eldiris, ke *Crouch* persvadis lin, fariĝi membro de la Ligo kaj ke *Crouch* diris, ke li alcelas la perfortan renverson de l' registaro. La spiono ankaŭ estis farinta sciigon al la aŭtoritatoj pri la letero al la Komunista Internacio, kiu estis retenita de la militist-aŭtoritato.

*Crouch* deklaris, ke li ne petis la kaporalon Fisher, fariĝi membro de la Ligo, sed ke ĉi tiu neniam estis membro, plue, ke la mencioj de Fisher pri laŭdiraj elparoloj de Crouch estas malveraj. La Ligo evidente ne estis sekreta organizaĵo. Sur bazo de la leĝo de Hawaii de 1884 la puno por tielnomataj sekret-organizaĵoj, kiuj ne posedas la permeson de l' guvernoro, estas tridek tagoj ĝis 1 jaro da malliberejo kaj monpuno de 100 dolaroj.

Dum sia enkarceriĝo la soldatoj estis traktataj brute kiel politikaj kaptitoj. *Crouch* tiel malbone estis traktata, ke li devis estis transportata en hospitalon.

La tribunalo deklaris *Crouch* kaj *Trumbull* kiel gvidantojn. *Crouch* unue estis kondamnata. *Li ricevis 40 jarojn da punlaboro. Trumbull estis kondamnata je 26 jaroj da punlaboro.* La aliaj soldatoj ankoraŭ atendas sian kondamniĝon.

Hawaii estas bazo de l' usona imperialismo. La intereso de la mondo direktiĝas nun al la ŝipar-manovroj, kies centro estas Hawaii. Hawaii estas la plej grava bazo de l' imperialistaj operacioj de Usono en la Pacifika Oceano. Plue ĝi estas kampo de l' kolonia ekspluatado. Miloj da indiĝenoj, filipinanoj kaj japanoj, sentas ĉi tie la maldolĉan ekspluatadon kaj militarisman tiranecon, kiu propras al ĉiuj kolonioj.

La simpatioj de la persekutataj soldatoj estis kun la ekspluatataj laboristoj kaj kamparanoj de l' Hawaiiaj insuloj. Ili ne faris krimon. Ili studis esperanton, ili reprezentis opiniojn, ili estis membroj de la Komunista Ligo de Hawaii, kaj de nenia sekret-organizaĵo, ili posedis literaturon kaj sendis leteron aŭ provis almenaŭ sendi, al la Komunista Internacio.

Estas interese, ke la laboristoj de Hawaii jam de kelkaj jaroj rimarkigas sian ribelemon kontraŭ la militestreco en sia granda ĉefurbo Honolulu. Strikoj en la rizkampoj kaj plantejoj estis oftaj. Nun la militestroj okazigas grandajn ŝipar- kaj armemanovrojn, kiuj kontrolu la solidecon de Hawaii kiel milita kaj ŝipara bazo. Jen la kaŭzoj, kial tiom bruteca verdikto estas farita kontraŭ la soldatoj *Crouch* kaj *Trumbull*.

En la laborista movado de Usono la juĝo estigis grandegan indignon. Maskunvenoj kaj laborist-organizaĵoj alvokis por protesto. La laborista gazetaro dediĉas al la kazo detalecajn artikolojn, kaj la usona sekcio de l' Internacia Ruĝa Helpo jam komencis la lukton kontraŭ tiu ĉi terorjuĝo.

La verdikto kontraŭ tiuj du soldatoj, kiuj kiel la unuaj en la usona mercenarula*) armeo manifestis sian solidarecon ne nur kun la amerikana, sed eĉ kun la kolonia laboristaro, estas ekstreme grandsignifa. La usona burĝa gazetaro ne kaŝas, ke la nunaj gigantmanovroj en Pacifika Oceano estas direktitaj kontraŭ Japanio. Ili estas la malkaŝaj preparoj al la nova de multaj jaroj minacanta mondmilito. La agado de tiuj ĉi usonaj soldatoj en la centro de la militaristaj preparoj estas minaco, kies signifo superas larĝe la kadron de l' malgrandaj hawaiiaj insuloj. Ĝi estas provoko de l' usona imperialismo, kiu fondis sian internan kaj eksteran politikon sur la kreo de rasa intermalamo kaj fendoj inter la laboristoj de l' diversaj naciecoj interne de Ameriko. *Crouch kaj Trumbull manifestis la intereskomunecon de la laboristoj de ĉiuj koloroj kaj nacioj, la intereskomunecon kun la Sovet-Unio.*

*) dungitula.

## Kio okazas en Aŭstrio?

*Faŝistoj mortigas. — Lokaŭto de tekslaboristoj. — Klasa justeco. — Pliakriĝo de la klaskontrastoj.*

La industriregionoj de Aŭstrio similas vaporkaldronon, en kiu estas bolanta akvo, kaj kiu, ŝajnas, iom post iom ne plu tenos tiun premforton. Certe ĉiu k-do estas informita, ke faŝistaj bandoj, post elekto de Hindenburg kiel prezidanto en Germanio, denove vekiĝis, precipe en Aŭstrio. Jam 3 anoj de socialdemokrata ŝirmligo estis viktimoj de tiuj aristokrataj bandoj, kiuj plej grandparte konsistas el aŭskultantoj de niaj ŝtataj altlernejoj. Iliaj kapitanoj kompreneble estas la eksoloneloj ktp., kiuj de post longa tempo timis nian respublikon, kiel talpo la lumon. La lasta k-do estis tiel kruele mortigita, ke post du tagoj ankoraŭ oni bone povis konstati sekan sangmakulegon sur loko, kie li mortis pro la revolucio. Faŝistaj bandoj solenis memorfeston en proksimeco de Mödling (najbara urbo de Wien) por honori mortintojn dum mondmilito. Ĉu ili eble havis la opinion ke la militviktimoj vekiĝos? Ve al vi, fikapitalisto, — se ili vekiĝus! En nenia lando estus anguleto, kien vi povus rifuĝi! Post fino de la memorfesto ili marŝis en direkto al laborista kvartalo, ankaŭ unu ŝarĝaŭtomobilo partoprenis, kaj ilia kapitano majeste rajdis sur ĉevalo. 3 anoj de socialdemokrata ŝirmligo, kompreneble sen armiloj, — kontraŭstaris al 70 faŝistoj, kiuj estis armitaj tre forte per revolveroj, buĉtranĉiloj, bastonoj ktp. Du per rapida kurado savis sin, bedaŭrinde la treege amata k-do Leopold Müller kiun estis sendinta la socialdemokrata partio kiel reprezentanto en komunumon Mödling, estis la kruelega viktimo kiun ni post ses jaroj travivis. Ni perdis unu el niaj pioniroj de l' socialismo, al ĉiuj gek-doj Leopold Müller estu vivanta simbolo de l' socialismo. Kelkajn tagojn post tiu malĝoja sciigo nia proletariaro denove estis surprizita, nome 15000 tekslaboristoj estis antaŭ unu semajno lokaŭtitaj, nur pro tio ĉar ili postulas plialtigon de l' salajroj, por ke fine la dommastrinoj povu satigi siajn malsatajn infanojn. Ili postulis nur du panbulojn po semajno, kio kostas 56000 kronojn (5 ŝil. 60 groŝojn[1]). En tiu lokaŭto partoprenis ankaŭ la teknika oficistaro, ĉar teksejposedantoj intencis eluzi tiun ĉi lokaŭton por ripari la jam delonge necesajn difektitajn maŝinojn. Sed nun la entreprenistaro mordis je granito[2]). La aŭstria proletaro kun streĉa atenteco sekvas la juĝadon de la akuzitaj faŝistoj, kiuj murdis nian k-don Müller. Jam nun ni povas konstati ke la faŝistaj akuzitoj, kvankam ili estas murdistoj, plej milde estas punotaj, kontraste al ribelintaj karbminejlaboristoj de Grünbach (ĉe neĝmontaro). Multaj fabrikoj faris simpatistrikojn de $1/2$ horo kaj protestis pro la maljusta agmaniero de nia registaro. En kelkaj vilaĝoj koleriĝis la laboristaro pro alveniĝo de ĝendarmoj, kaj oni ne miru, se malgrandaj bataloj okazus. Nun, gekamaradoj, el tiu ĉi malgranda elĉerpaĵo el aŭstria marĉo, oni vidas, ke la burĝaro prepariĝas por enlanda milito. Kiam venos la tempo, kiam ne plu la proletariaro tenos la nukon sub la jugo? Nur tiam ni povos voki: "Nun ni estas liberuloj."

*SAT-ano n-o 857.*

## KORESPONDEJO

*5089.* Jes, — kvankam nur eldonebla fine de nuna jaro.

*4967.* La belan versaĵon mi transsendis al S. R.

*4663.* Ric. viajn art. Sama temo jam raportita en n-o 32.

*4028.* Mi resendos la leteron tuj post uzo. *Red.*

1) 1 dol. = 70635 kronoj. Red.

2) Parolturno: trafis fortegan kontraŭstaron. Red.

# Sama rajto por ĉiuj en Germanio

La intertraktadoj de ekspluatantoj kaj ekspluatatoj ĉiam finiĝis laŭ deziro de la unuaj. Por ili ne sufiĉas obstine venki en malgrandaĵoj, ili provas kaj sukcesas en grandaĵoj. Tion pruvas sekvantaj ciferoj.

Por militviktimoj la respublika, demokrata regna parlamento ne volis aprobi 150 milionojn por plibonigo de la rentoj; samtempe la Ruhr-industriistoj donace ricevas, sen parlamenta decido, 700 milionojn.

Al nevundita generalo Ludendorff la glorinda respubliko alŝovas monatan "renton" de 1830 mk; por invalido de mondmilito kapitalista devas sufiĉi 16 mk. en sama tempo.

Majorvidvino bezonas 780 mk., sed por vidvino de laboristo nur monate estas disponeblaj 12 markoj. *H. W., Dresden.*

# Maja festo en Japanio

*Multnombra partopreno, ankaŭ de laborantaj virinoj. — Multeco de polica gardistaro en la ĉefurbo kaj en Nagoja. — Arestoj. — La devizoj de ĉi-majo.*

Tokio: Pli ol 10000 laboristoj en Arimagahara kolektiĝis por festi ĉi-tagon en la nomo de l' tutmonda proletaro. Ĉ. 150 virinoj aliĝis. Estas notinde, ke pli ol 40 virin-konduktoroj (de tramoj) estis inter la kunvenintoj. Ĝis la lasta tempo oni ĉiam plendis kaj riproĉis, ke japaninoj ne estas klaskonsciemaj. Ĝis nun konduktoroj de la tramo estis nur viroj, kaj de aprilo, prove virinoj estis dungitaj. Malgraŭ tio pli ol 40 forlasis la postenon en ĉi-tago kaj aliĝis la festantojn.

La paroladoj komenciĝis, kaj la oratoroj sekvante unu la alian stariĝis sur la estradon, kaj unu post la alia al ili estis malpermesite paroli de gardantaj policanoj. K-dino Sedo Hacuko elveturis el Kiuŝu'a mino, 720 mejlojn ĝis Tokio, kaj partoprenis. En ĉi-tago ĉ. 3000 policistoj gardis, — malhelpis! Posttagmeze oni faris demonstracion ĝis Ueno, malgraŭ ĉiuspecaj malhelpaĵoj flanke de la policistoj. En ĉi-tago 260 kamaradoj estis arestitaj de la policanoj. Ĉiuokaze pli vigle ol en la lasta jaro la tago estis festita. Ekz. en Ŝibaŭra elektra stacio, el 2500 laboristoj nur 450 ĉeestis en fabrikejo. Ti-kiuj ĉeestis, estis preskaŭ nur la laborantoj en oficejo, kaj tial laboron ili ne povis fari. Kaj en Hakubunkan-presejo nur 30% ĉeestis por labori, en Oki elektra Ko. nur 7, Nippon elektra Ko. 200 el 800 venis, kaj en Suzuki Cemento Ko. neniu venis laborejen!

Osaka: Pli ol 20000 laboristoj, kamparanoj, teksistinoj kunvenis en Nakanoŝima parko kaj festis. Poste ĝis Tennoji parko ili faris demonstracian marŝadon. Tre vigle oni festis la tagon.

Kioto: Ĉ. 2500 kunvenintoj faris demonstracian marŝadon. Inter la kolektiĝintoj sub la standardo laborista 2 kinema-aktorinoj estis trovitaj.

Nagoja: Eble plej severe en Japanio la festantoj ĉi-loke estis premitaj de la policanoj. Sama nombro da policistoj estis metita por 600 kunvenintoj. En Curumaiparko oni festis la tagon.

La moto de la ĉi-maja festo estis:

1. Por senlaboruloj la registaro faru savagadon.
2. Por kamparanoj ne bienposedantaj donu rajton.
3. Entombigo de la bilo kontraŭ socia movado. *SAT. 2455*

# El sovetlanda urbeto

Ni eltiras la sekvantajn liniojn el letero adresita de k-do loĝanta en ukrainia vilaĝego al korespondanto en okcidenta Eŭropo, kiu deziris por klarigo detalojn pri la sovetlanda vivo. Ĝi certe interesos multajn el niaj legantoj. *Red.*

*La nova administrado: strukturo de sovetoj. — Dum periodo de civila milito. — Lernejaj aferoj. — Legejoj kaj aliaj kluboj por plenkreskuloj. — Fizika kulturo. — Infana (pionira) movado. — La partopreno de l' kamparo.*

... Nia urbeto estis antaŭe "ujezda" kun ĉ. 12 miloj da loĝantoj ("ujezdoj" estis nomataj partoj, je kiuj estis dividitaj la "gubernioj"); ĝia ujezdo, t. e. areo de ĝia administreco, atingis ĝis 10000 kv. km. (ĉi-tio, nature, estas troa por tia nesignifa centro). Post la revolucio ĝia ujezdo estis dividita en du partojn, kaj sfero de l' administrado duoble plimalgrandiĝis. Fine en 1923, kiam la rajonig-reformo neniigis la ujezdojn en Ukrainio, ĝi fariĝis "rajona centro" (ĝia rajono*) enhavas ĉirkaŭ 650 kv. km. kaj kalkulas entute ĉirkaŭ 67500 loĝantojn), subigita al "distrikta" centro (Ĵitomiro, kiu estas samtempe ankaŭ gubernia centrejo), kiu, post estonta (en ĉi-jaro) neniigo de gubernioj, estos interligita senpere kun la respublika centro — Harkovo. Tia estas la nova „triŝtupa" sistemo de administrado en Sov.-Ukrainio: la centro administras distriktojn, la distriktoj — rajonojn, la rajonoj — "vilaĝsovetujojn" aŭ simple vilaĝsovetojn, kiuj unuiĝas po 3--5 ĝis 7 vilaĝoj:

Centro

↑ ↑ ↑

Distrikto — Distrikto — Distrikto

Rajono Raj. — R. R. R. R. — Raj. Raj. Rajonoj

V. S. V. S. V. S. — V. S. V. S. — Vilaĝaj Sovetoj

Sed administri ĉe ni ne signifas sufoki per la severa centralismo, sed simple laŭplane reguligi la lokan laboron, celkonforme distribui niajn malabundajn monrimedojn ktp. La rajonoj havas siajn buĝetojn, kaj de ĉi jaro eĉ ĉiu vilaĝsoveto havos sian etan buĝeton, kiu estos ekzekutata el parto de kampar- (land-) mastruma depago, ĉetenata per la lokoj speciale por tio. Kompreneble estas, kian signifon havas tia memstareco de l' lokoj por la disvolvo kaj manifestiĝo de ilia aktiveco — tia masaktiveco, kia estas ĉefa kaj sola apogo de l' sov. potenco.

La urbeto mem multe suferis en tempoj de l' civila milito, ĉar, kuŝante en apudkordona regiono, ĝi estis areno de malamikaj agoj de ĉiuj interbatalintaj fortoj (petluranoj, poloj, bolŝevikoj), estis oferdono de kanonadoj, judbategadoj ktp. Estis ruinitaj ne malpli ol 100 domoj, el kiuj ankoraŭ ĝis nun staras ĝuste en la centro de l' urbeto ne malpli ol 40, neniel ornamante la aspekton kaj plimalvastigante la utilan (loĝeblan) areon. Ĉar ni estas ankoraŭ tro malriĉaj por finleki tutajn niajn vundojn kaj tute restarigi nian ekonomian sanecon. Kial? — Ĉar ni estas ankoraŭ solaj.

La loĝantaro de l' urbeto signife malkreskis post militaj okazantaĵoj. Tamen la vivo ne ekdormis: la revolucio alportis kun si refreŝiĝon de l' kultura ekzistado. Vere, ke la lastan tempon antaŭ la milito N.-V. havis 9 lernejojn kun 1800 gelernantoj (infanoj) kaj 57 pedagogoj, kaj ke nun la nombro de lernantaj infanoj estas nur 1100 (en 5 lernejoj) kun 35 instruistoj, t. e. komparate kun la antaŭmilita situacio, la nombro de lernejoj kunmetas nur 55 proc., la nombro de infanojlernantoj kaj de pedagogoj — 61 proc. Sed rememorante, ke tuta loĝantaro de l' urbeto atingas nur 80 proc. de antaŭmilita, ni devas konfesi, ke l' nivelo de infana klerigo ne tiel malkreskis (antaŭe lernis 15 proc. da loĝantaro, nun 11,5 proc.) Krom tio — la fenomeno tute nova — la revolucio donacis al N.-V. tri specialajn lerninstituciojn por plenkreskaj kun 260 lernantoj kaj 15 pedagogoj: Pedagogiaj Kursoj ("Pedkursoj"), nia Partlernejo (v. "S." n. 24) kaj landmastruma lernejo por idoj de landdungitoj, aŭ "batrakoj" ("Batraka Lernejo"). Do ni havas nenian kaŭzon plendi la krutan falon de nia kultura nivelo post la revolucio, aŭ nian "resovaĝiĝon".

En la rajona kadro estas tia stato:

| | |
|---|---|
| Nombro de lernejoj: | 45 |
| „ „ lernantoj: | 3200 |
| „ „ instruistoj: | 60 |

Mi revenas al la urbo. Antaŭ la revolucio el "kultur-klerigaj" institucioj por plenkreskuloj ekzistis nur "Domo de nobla kunigo" kun kartludado kaj lotoo kaj "Militista klubo" por oficiroj. Ĉe "Mil. klubo" estis biblioteko; la alia ekzistis — publika; ambaŭ havis entute ĉirkaŭ 10 milojn da libroj, el kiuj 3/4 estus neniigendaj (pro ilia netaŭgeco), se ne ili estus disrabitaj dum civila milito. Nun ni havas ukrainan "Laboristvilaĝanan Ejon" kun preskaŭ 1000 membroj (nur profliganoj kaj malriĉaj kamparanoj), kun 100—300 ĉiutagaj vizitantoj, kaj kie funkcias biblioteko (4000 volumoj da belaj libroj, 400 abonantoj, 32 moveblaj bibliotekoj por la vilaĝoj), legejo (60 vizitantoj ĉiutage), grupoj por likvidado de nelegiveco, tiu malhonesta heredaĵo de l' pasinto (70 lernantoj), ĉirkaŭe 20 rondetoj (kluboj politikaj, natursciencaj, artaj, sportaj k. a.), 6 profesiaj "anguloj" (kun apartaj bibliotekoj ktp.), scenejo k. s. En la sama "Ejo" kuniĝas preskaŭ ĉiutage tiu aŭ alia proforganizaĵo por sia urbkunsido aŭ rajonkunveno, anoj de "komitato de malriĉaj kamparanoj",

*) rajono = subdistrikto. — Red.

organizitaj virinoj, anoj de “Komunista Ligo de Junularo“ (komjunliganoj) ktp. Nature, ke gejunularo plipezas laŭnombre, sed nur plipezas, — kaj la plenkreskuloj prezentas ankaŭ signifan partumon. Ne estos sen intereso por vi ekscii, ke, krom la ukraina, antaŭ ne longe estas organizita ankaŭ germana “Bauernheim“, disvolvanta iom-post-iom sian laboron (en nia rajono loĝas multaj germanoj; unu el urbaj lernejoj estas ankaŭ germana — kun 130 lernantoj kaj 8 instruistoj).

La fizkulturo (gimnastiko, sporto) tute forestis antaŭ la revolucio. Nun komencis sian funkciadon “Sofik“ (Soveto de fizika kulturo), kiu entiris dum 3 monatoj jam kvincent infanojn kaj 150 gejunulojn; sed la afero kreskegas. Kreskas ankaŭ la infana kom.-movado, kaj ekzemple la vesperon de l' sama tago, kiam mi akceptis vian leteron, 60 geinfanoj publike elparolis la solenan promeson de l' juna pioniro “fortike stari por la afero de l' laborista klaso en ĝia batalo pro liberiĝo de laboristoj kaj kamparanoj de l' tuta mondo“, kaj ricevis la ruĝajn kravatojn; la plej juna ne havis ankoraŭ plenajn 10 jarojn, tamen estis aligita “pro aktiveco.“ La tuta nombro de l' pioniroj estas (sen kamparo) ĉirkaŭ 500... Nu, kio ankoraŭ? 4 scenejoj en la urbo (kontraŭ du antaŭrevoluciaj), kino...

Sed la urbeto ne ĝuas sola, nedividinte kun kamparo, tiajn bonojn de l' vivo — kaj tia egoista trajto estis tre karakteriza por la antaŭrevolucia urbo ĝenerale. Vi jam vidis, ke ekzistas en N.-V. speciala agro-lernejo por batrakidoj, ke la vilaĝanoj estas kutimaj gastoj de l' “Lab.-Vil.-Ejo“. Aldonu al tio, ke en la urbaj lernejoj lernas ne malpli ol 40 proc. da kamparanidoj, ke ili konsistigas 60 proc. da pedkursanoj kaj 50 proc. da partikursanoj; ke en la rajono ekzistas jam 35 vilaĝaj “legdomoj“ (aŭ “domoj-legejoj“); kel' rajona profcentro (Profsekretariejo) speciale sin devigis efektivigi “kultĉefecon“ super unu el vilaĝ-sovetoj de l' rajono, ke nia Part. Lernejo la samon faris por alia v.-soveto, La Rajona Ekzekutiva Komitato (REK) — por la tria ktp.; ke niaj partikursanoj kun pedkursanoj kaj la lektoroj ĉiusemajne vizitas laŭplane tutajn la plej proksimajn vilaĝojn (iafoje en distanco de 15—20 km) por kultlaboro — kaj vi ekvidos, ke la kamparo ne estas forgesita. (Finota.)

*G. Filipov.*

## Kion parolas ciferoj?

El raporto de Popola Komisaro de SSSR k-do Sokolnikov al la III-a Tutsovetia Kongreso de Sovetoj (19. V. 25) ni ĉerpas jenajn interesajn ciferojn, kiuj ebligas al ni observi kiajn ŝanĝojn kaŭzis la revolucio en buĝeto de iama Rusio:

En la buĝeto de carisma Rusio elspezoj por armeo kaj ŝiparo okupis 26,8% de la tuta buĝeto, en la buĝeto de SSSR — nur 16,9%, elspezoj por kovri ŝtatajn prunteprenojn — ĉirkaŭ 12% en la cara tempo kaj 3% nun. Same malkreskis iom la elspezoj por la enlanda administrado.

Rekompence kreskis kompare kun la cara tempo jenaj elspezoj: por la popola klerigado kaj sanigado estis elspezate en la antaŭa Rusio 5,9% de la buĝeto, nun — 11%, por subteno kaj disvolvo de agrikulturo — 3,9% antaŭe kaj 8% nun, por subteno de industrio respektive 1% kaj 6% kaj por subteno de transporto — respektive 30% (inkluzive la elspezojn de privata fervojaro, nun nacionalizita) kaj 38%.

Tiuj ciferoj estas vere atentindaj, kvankam ili parolas dume nur pri la tendencoj de ŝtata mastrumado en Sovetio, sed ne pri la absoluta kresko de la bonstato. Ja la buĝeto de SSSR, kvankam duoble kreskinta dum lastaj 3 jaroj, atingas en nuna jaro nur 60% de la antaŭmilita rusia buĝeto kaj la landa poanima enspezo (t. e. sumo de ĉiuj enspezoj dividita je la kvanto de loĝantaro) nun prezentas nur 51 rublojn kompare kun 100 rubloj de la antaŭmilita Rusio, kaj kompare kun 626 rubloj de nuntempa Usono. Se la senmilita periodo daŭros ankoraŭ kelkajn jarojn, ni certe havos la eblon observi, ĉu la supremontrita tendenco en la buĝeto de Sovetio rezultigos altiĝon de la landa poanima enspezo aŭ tion eble pli akcelas la tendencoj, aplikataj en la landoj kapitalistaj.

1516.

## Sciigoj el Oriento

1. Karaĥan — ambasadoro de Sovetio en Ĉinio — estas nomita ĉefo de ĉiuj diplomatoj en Pekin. En fino de aprilo li legis lecionon pri Sovetio kaj popoloj de oriento por ĉinaj studantoj en supera lernejo *Czin Gua*. Li konsilis batali kontraŭ okcidenta imperiismo kaj imiti Sovetion. Karaĥan estis brue aplaŭdita de multaj aŭskultintoj.

2. En komenco de majo en mezo de Azio (ĉe lago Bajkal) okazis forta tertremo. Glacio sur Bajkal rompiĝis neatendite. Pli ol 35 glitveturiloj kun ĉevaloj kaj homoj restis sur lago. Nur 16 el ili estas savitaj. Ili longe flosis en la lagomaro sur glacipecoj. Irkutsk ne suferis pro la tertremo.

3. Tra tuta Mongolio inter *Urga, Ulasulaj* kaj *Kobdo* estas aranĝata telegraflinio. Vojo inter Urga kaj Irkutsk estas bonigata. Komerco inter Sovetio kaj Mongolio kreskas. Fama arkeologo *Kozlov* trovis en Mongolio antikvan tombejon. Ĝi entenis multajn objektojn el antikva Grekio. La eltrovo pruvas, ke centra Azio havis rilatojn kun Grekio antaŭ multaj jarcentoj.

Amerikanoj same interesiĝas pri arkeologio de Mongolio kaj en fino de aprilo sendis jam trian ekspedicion tra Mongolio el Pekin al Altaj-montaro.

4. En Kanton, Tjan-czin en komenco de majo okazis grandaj kontraŭimperiismaj demonstradoj. Sole en Kanton partoprenis pli ol 10000 laboristoj, vilaĝanoj, soldatoj. En Pekin 3 studentoj estas mortigitaj antaŭ domo de popolkleriga ministro, multaj studentoj estas vunditaj kaj arestitaj. En Ŝanĥaj strikis laboristoj de japana teksfabriko Nagaj'. *Ĉan-Dzo-Lin* daŭrigas mobilizon de sia armeo kaj minacas al Pekin.

*Maksim Krjukov.*

## Brita nacia konferenco de Internacia Laborista Helpo en London

La brita ILH-konferenco, kiu dum mezo de aprilo okazis en London, havis multe pli ol nacie limigitan karakteron per la multnombra kaj viva partopreno de la reprezentantoj de sindikataj organizaĵoj. Por plene taksi la specialan signifon de tiu ĉi intereso ĝuste de la anglaj sindikatoj por la ILH, oni devas memori, ke la sindikatoj en Britio ludas influplenan rolon, ke ili politike havas pli grandan influon ol la Labor-Partio, kaj ke ili ampleksas la membrojn de ĉiuj laboristaj partioj, inkluzive la komunistoj. Tial ja la britaj sindikatoj povis, ĉar ili en si jam efektivigis kompaktan unuecon de la laboristaro, ankaŭ fariĝi la pioniroj de l' internaciaj unuecigaj celadoj, kiuj nun kun la devizo Amsterdam-Moskvo postulas la internacian unuecfronton de l' tutmonda proletaro sur bazo de la sindikatoj.

Sur tiu bazo renkontiĝas la celoj kaj interesoj de l' sindikatoj kun tiuj de ILH.

Kio estas la britaj sindikatoj por la laborista movado de Britio, unueca superpartia organizaĵo, neŭtrala kvazaŭ fundo, sur kiu ĝeneralaj proletaraj klasinteresoj estas reprezentataj kaj celkonformaj postuloj estas farataj, tio estas ILH kiel interhelpa organizaĵo en tutmonda skalo.

Kiom forta estas la kreskanta intereso, tion montris la angla konferenco de ILH, pruvita per jenaj faktoj: 165 sindikataj, kooperativaj kaj partiaj organizaĵoj, reprezentantaj la plej gravajn organizaĵojn de Britio, partoprenis la konferencon. (En la listo ni trovas ankaŭ la nomon de la Orient-Londona Esperanto Grupo Lab.)

La konferenco akceptis rezoluciojn, en kiuj oni postulas la kooperadon de la sindikatoj kun la kooperativoj, kiel antaŭkondiĉo por ampleksa help-agado de ILH.

La konferenco, kiu kunvenis, por solvi organizajn demandojn, por prepari kampanion por la malsatantoj en Irlando, fariĝis vere demonstracio por la internacia kunligiĝo de l' laboristaj masoj, ne nur en la organizo de l' proletara memhelpo, sed ankaŭ en la sindikata movado.

## TRA LA KLASBATALO

En Shanghai kaj aliaj urboj de Ĉinio okazas grandaj strikoj, je kiuj partoprenas centmiloj da laboristoj. Studentoj organizis stratbatalojn, kiuj alprenis grandan amplekson kaj estas direktitaj kontraŭ la imperialistaj potencoj, kiuj sendis militŝiparon kaj regimentojn al la minacataj regionoj.

En Maroko la francaj trupoj retiriĝis preskaŭ senĉese. Abdel-Krim persiste ofensivas.

La terura varmego en Usono postulis centojn da viktimoj.

En Germanio plimultiĝas faŝistaj provokoj kaj atakoj. En Teltow ĉe interpuŝiĝo mortis tri kamaradoj. En Remscheid faŝistoj provis enpenetri la popoldomon, ankaŭ en Chemnitz ili atakis laboristojn.

La granda dana striko estas finita per kompromiso, kiu donas al la laboristoj mezan salajr-plialtigon de 3 pfenigoj (4 centimoj svisaj).

En Ĉilio okazis grandaj strikoj, kiuj estas subpremitaj per militistaro. La laboristoj estis okupintaj fabrikojn.

Pro mortigo de la "Sirdar" la akuzitaj egiptaj revoluciuloj estis mortkondamnitaj.

# El la Vivo kaj Scienco

## "Ebriiganta" Lina Oleo.

I.

Dum jaro 1924 nia mikologa-sema laboratorio ricevis unuajn komunikojn pri la stranga influo de lina oleo je homoj nutriĝintaj de tiu-ĉi oleo. Vilaĝanoj de Gomelskaja gubernio (Ruslando), manĝintaj panon kun tiu-ĉi oleo, kondutis tre malordinare.

Ekzemple:

Vilaĝano post matenmanĝo dum kiu li manĝis panon kun lin-oleo, subite diris ke li tuj fariĝis soldato kaj devas iri militon. Je tiuj-ĉi vortoj li prenis hakilon (anstataŭ militan armilon).

Edzino de tiu-ĉi vilaĝano, ankaŭ manĝinta panon kun la oleo, subite fariĝis domkonstruisto kaj ekprenis alian hakilon.

Maljunulino, al kiu "pro ŝerco" oni donis por manĝi brasikon kun la ebriiganta oleo, baldaŭ estis neordinare ĝoja kaj komencis dancadi.

Vilaĝano, manĝinta pomon kun la oleo, eliris el sia domo kaj komencis kriegi sen ia rimarkita kaŭzo kaj ne pro ia doloro.

Juna virino post manĝo de pano kun oleo tutan nokton kantis, — konduto en nomita regiono ne deca por edzino.


Kiel oni povas vidi, la oleo influas simile al vino. Sed en ĝia influo estas kelkaj diferencoj. Homoj post ĝoja periodo estas tre malfortaj. Ĉe ili doloras tuta korpo, tremas manoj kaj piedoj, estas halucinoj ktp. Pano aŭ brasiko sen oleo ne havas malutilajn ecojn. Sekve la oleo estas efektive kulpa pro ebriiganta influo.

Nia laboratorio ricevis el nomitaj regionoj specimenojn el tiuj lin-semoj, el kiuj estis ricevita "ebriiganta" oleo. Botanika analizo de miksaĵoj montris, ke inter almiksitaj semoj de diversaj herboj forestis venenaj. Mikroskopa kaj mikologia analizo de linsemoj kaj almiksitaj al ili semoj de diversaj herboj montris, ke ili estas infektitaj per unu fungo apartenanta al gento latine nomita "Fusarium" Lk. (vidu la bildon).

En Rusio jam antaŭlonge estas konata "ebriiganta" pano. Tiu pano estas venena por homoj kaj bestoj. Ĝin oni ricevas el faruno sekala, tritika aŭ avena. Semoj donantaj "ebriigantan" panon estas ankaŭ infektitaj per fungo apartenanta al la gento "Fusarium" Lk.

La ebriiganta linoleo per sia influo je homoj similas ebriigantan panon, kaj fakto pri l' infekto de linsemoj per fungo de tiu sama gento donas bazon por konkludo, ke venenaj ecoj de l' oleo estas kaŭzitaj per parazita fungo.

Komparativa detala ellernado de la fungo montris, ke ĝi estas nove trovita organismo.



Konidioj (semoj) de fungo kaŭzanta ebriigajn ecojn de la lin-oleo.

Sur kaj en linaj kreskaĵoj amerikana fitopatologo Bolley trovis dum 1901 fungon el gento Fusarium kaj nomis ĝin "Fusarium lini Boll".

Trovita de ni fungo havas gravajn diferencojn kun *F. lini*.

II.

Trovinte novan parazitón sur la lino, ni komencis ellernadi multe da specimenoj de lin-semoj por ke klariĝu: ĉu estas nur *F. lini* sur la lino, aŭ ĉu ankaŭ aliaj specoj de la sama gento povas pereigi linajn kreskaĵojn. Rezultatoj de niaj observoj kaj eksperimentoj tute klare montris ke ne nur *F. lini Boll.*, sed ankaŭ multenombraj specoj de sama gento povas parazitadi sur linaj plantoj. Krom tio infekto-eksperimentoj pri diversaj specoj de la gento Fusarium donis fakton pri grandega nekonstanteco de morfologiaj ecoj (micelio, konidioj kaj aliaj) de diversaj Fusariumoj. La fakto igis nin entrepreni pristudon de granda kvanto da diversaj fungoj de tiu gento, kaj nun ni havas multe da faktoj pri ŝanĝiĝo de studataj organismoj sub influo de eksteraj kondiĉoj. Bedaŭrinde ni ĝis nun pristudis nur specimenojn de lino, tritiko, sekalo, aveno kaj diversaj loloj kreskantaj en Ruslando.

Estus tre interese, se oni povus ricevi, por kompara studo, specimenojn el la plej diversaj lokoj de la mondo. Tial mi min turnas al ĉiuj esperantistoj kun peto, ke ili sendu al ni se eble specimenojn de nomitaj semoj (10—20 gramojn de ĉiu).

Kompara studo de fungoj trovitaj en diversaj lokoj de la mondo povas klarigi demandojn pri rezisteco de diversaj utilaj kreskaĵoj kaj pri ecoj ricevitaj de organismo sub influo de eksteraj kondiĉoj.

La plej granda pleneco kaj konvinkigeco de similaj faktoj estos ebla, se nia laboratorio havos la plej diversan materialon ricevitan el la plej diversaj lokoj de la mondo.

Se esperantistaro helpos nian laboratorion ricevi bezonan por ni materialon, ĝi helpos ne nur al fitopatologio sed ankaŭ al Esperanto mem, donante novan argumenton de utileco de artefarita lingvo por sciencaj laboroj.

La studataj de ni fungoj parazitas sur la plej diversaj kreskaĵoj. Nur tiaj objektoj, kiel semoj de sekalo, tritiko kaj similaj, povas esti facile sendataj. Sed estas tre dezirinde havi fungojn de tiaj kreskaĵoj, kiel terpomoj, bananoj, ktp.

Multenombraj specialistoj fitopatologoj de tuta mondo studas la parazitojn de gento Fusarium. Ni nin turnas kun varma peto: tie, kie estas eble, transdonu nian peton al specialistoj de ĉiuj landoj por ke ili sendu, se eble, „vivajn kulturojn" de fungoj el gento Fusarium al nia laboratorio.

Elstudata de ni gento povas de diversaj flankoj interesi ankaŭ mikrobologojn, selektistojn kaj aliajn. Diversaj laboratorioj povas havi organismojn interesantajn nin, kaj ni tre deziras rilati kun ili pere de servemaj kaj dankataj esperantistoj.

*M. Dunin*

ul. Gercena 14 A kv. 21. Mikrologo-sema laboratorio *Moskvo* (Ruslando).

NB. — Ni tre dankos pro jena informo: ĉu oni povus ricevi natursciencan literaturon el via lando (speciale botanikan, fitopatologan, mikologan, mikrobiologan kaj similajn gazetojn, revuojn aŭ verkojn) — kaj kion ni devas fari por ĝin ricevi (abonpago, eldonejo, ktp. . . .).

# Fera avĉjo

Avĉjo Kalinin — prezidanto de Centra Ekzekutiva Komitato de Unuiĝoj de SSR, alie nomiĝas tutunuiĝa estro, gvidas diversajn aferojn de nia Unuiĝo, prezidas kongresojn kaj subskribas leĝojn.

Ĉie kaj ĉiam li estas preta. Eksterlandaj ambasadoroj venas de regnoj, kiuj nin konfesas "de jure" — baldaŭ al avĉjo: "Nian al vi estimon, sinjoro Kalinin. Ni delonge volis konfesi vin, kaj nun via renaskiĝanta lando"... — Dolĉe ili ludas, kaj avĉjo kun rideto respondas: "Jes, ni vin ankaŭ tre estimas. 7 jarojn ni atendis..."

Avĉjo ne amas multe paroli, ĉar li havas multe-multege da aferoj diversaj. Li diras nur ion gravan — kaj eĉ ne unu vorton superfluan, senutilan li aldonas.

Dormas avĉjo malmulte. Ankaŭ ne multe da tempo li havas por ripozo. Sian ripozon li uzas por akcepti vilaĝanojn. Ili venas al li rekte el vilaĝoj por klopodi pri tero, loĝejoj, kooperativoj ktp.

Rekte je dua horo avĉjo jam estas preta.

— Kion vi deziras? — demandas li vilaĝanon en bastaj ŝuoj.

— Ni estas el Skolpino[1]... Ni deziras traktoron ricevi, sed forestas ĉe ni mono...

(Fino paĝo 6, 3-a kol.)

1) Skolpino — malgranda vilaĝo.

# La Vivo argumentas por ni!

*Malhelpoj de diverslingveco ĉiam kreskas. — Politikaj gvidantoj kaj aktivuloj pli kaj pli ofte konfesas tiujn malhelpojn. — Nia argumentaro riĉiĝis per la novaj atestoj de k-doj KALININ, AMTER kaj SEN KATAJAMA. — Instruado de Esperanto en lernejoj — jenan taskon metas SEN KATAJAMA antaŭ ni.*

Raportante pri la tria kongreso de Amerika Laborista Partio en pasinta jaro, K-do Amter interalie prezentis al legantoj de Moskva *Pravda* jenajn liniojn:

"Kiel evidentiĝis el la raporto de l' partia sekretario, la partio kalkulas 25000 membrojn, kiuj dividiĝas je 16 lingvaj federacioj kaj 7 aliaj lingvaj grupoj, ne sufiĉe multenombraj por formi federaciojn. La plej granda estas la finna federacio kun 7000 membroj, post ĝi sekvas la angla — 2000 membroj; sed necesas konsideri, ke duono de partimembraro parolas angle. *Estas klare, ke tiu ĉi multlingveco estas grava baro en laboro de la partio.*" (Pravda, N-o 44 de 1924.)



Se la multlingveco faras malfacilaĵojn en partia laboro, do des pli grandaj ili estas, kiam temas pri la politika laboro inter vastaj laborulaj amasoj, precipe en Sovetio, en kiu unuiĝis tiom multaj diverslingvaj popoloj. Kaj ne lasas sin longe atendi la konfesoj pri ili flanke de politikaj agantoj: jen K-do M. I. Kalinin, priskribante sian vojaĝon tra Uzbekistano (Uzbeka SSR), rakontas interparoladon kun tieaj kamparanoj:

"Komence la konversacio iris kun sufiĉa peno. Necesis ĉiun vorton tiri el la kamparanoj kvazaŭ perforte . . . *La ĉefa malfacilaĵo de la interparolado estis, certe, la diverseco de lingvoj. Kiom ajn bonaj estus la tradukistoj, tamen la tradukado restas tradukado kaj, ĉefe, vi ne povas kapti la intonacion de voĉo, la nevolajn aklamojn, vizaĝesprimon de l' oratoro k. t. p. Siavice, ankaŭ vi ne povas senpere influi. La tradukisto laŭ sia plaĉo faras la akcentojn, kaj, verŝajne, tre ofte, spite al vi, tute aliloke.*" (Moskva Izvestija, N-o 55 de 1925 j.)

Kaj tamen, ja tradukistoj regas dum la politikaj kongresoj internaciaj — rigardu la bildon apudan: estas unu el fotografaĵoj de la lasta plilarĝigita Ekzekutivo de Komunista Junular-Internacio. La revuo (*Ogonjok*, N-o 17 de 1925), el kiu ni ĉerpis la foton, akompanis ĝin per jena karakteriza subskribo: "*Unu el la kutimaj scenoj de la plenkunsido — tradukado de paroladoj de raportantoj.*"

Pravan konkludon do faras la japana K-do, membro de Ekzekutivo de Komintern, Sen Katajama en sia letero al Dolinska Grupo Esperantista. Tiun leteron, verkitan respon-de al la demando pri lia rilato al Esperanto, ni citas plene pro ĝia komuna intereso kaj granda valoro:

"*Mi estas danka por via signo de saluto kaj responde mi deziras diri, ke kvankam mi mem ne havis bonokazon studi Esperanton, tamen mi estas tre interesita pri ĝi kaj mi sincere esperas ke tiu ĉi internacia lingvo baldaŭ fariĝos reale internacia kiel principe, tiel same en la praktiko kaj en la humaneco, kaj precipe nia movado, la komunista movado, gajnos per la lingvo tiel taŭga por internacia laboro kaj propagando.*

*Tiom, kiom mi havis spertojn, mi sentis ĉiam, ĉeestante la internaciajn kongresojn, la malfacilaĵojn pro tradukado de okazaĵoj kaj paroladoj, kiuj havis lokon dum kongresoj, kaj se Esperanto fariĝos oficiala lingvo, samkiel franca aŭ germana, tiam kongreso povos ŝpari multan tempon kaj la priservadon de la kongresanoj kaj ebligi al ili senti sin pli homece kaj ricevi ĉiujn bonojn de la kongreso.*

*Tial mi ofte pensis pri Esperanto, ke ĝi estos instruata en la unua- kaj duagradaj lernejoj de ju lando, ni supozu, unu aŭ du horojn semajne. Tiam ĝi estos plene taksita de la popolo. Mi esperas, ke la tempo venos, kiam Unio de SSR adoptos Esperanton en siaj unua- kaj duagradaj lernejoj tra la tuta lando, ĉar USSR povas fari ĉion ajn bonan por la popolo. Mi esperas, ke vi konsideros ĉi tiun problemon, kiam vi kunvenos por solvi ĝin. Uzi unu aŭ du horojn semajne por Esperanto en unuagrada lernejo — tio signifos nenion, se tio alportos rezultojn dum postaj jaroj.*" (Letero de 12. V. 1925.)

K-do Katajama klare metas antaŭ niaj sovetiaj kamaradoj ilian proksiman taskon — labori por enkonduko de Esperanto en lernejojn. Tio ne signifas celi unuavice permeson de la instruado, tio ja signifas jam nun pretigi nin per preparado de taŭgaj instruistoj kaj instruiloj al la fakta enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Ĉar, havante spertajn instruistojn kaj taŭgajn instruilojn, ni ja facile povos en sovetiaj kondiĉoj akiri la dekreton permesantan la instruadon; por tio kuraĝigas nin, samkiel la alilandajn kamaradojn, jenaj linioj de Katajama, kiujn li prezentis por publikigo en "Soveta Esperantisto" (propaganda ruslingva revuo):

"*. . . mi scias, ke Esperanto estas la plej grava kaj utila lingvo iam ajn inventita. Carlyle (elp. Karlajl) diris iam, ke komencanto de ĉiu reformo estas unu, sed nun vi havas milionojn, kiuj batalas por propagandi Esperanton al la popolo. Ni, la komunistoj, devus peni fari tiel ĉar nia laboro estas precipe la propagando inter diversaj nacioj kaj rasoj, kiuj parolas diversajn lingvojn. Por plifaciligi la propagandon kaj malgrandigi ĝiajn malfacilaĵojn Esperanto estas la plej bona rimedo. Mi esperas, ke la tempo baldaŭ venos, kiam Esperanto estos konsiderata kiel la plej bona internacia lingvo por la internaciaj kongresoj!*" Kolektis *G. Dem.*

---

(Daŭrigo de paĝo 5.)

Ni petas vian helpon, por ke oni al ni donu kredite . . .

Avĉjo tralegas paperojn kaj surskribas "Donu traktoron prunte!"

Vilaĝano iras ĝoja al pordo kunpremante paperojn, returniĝas:

"Estu sana, Miĥailo Ivanoviĉ. Dankegon grandan . . ."

Tiel laboras nia avĉjo, ĝis kiam oni lin petos alveturi en VCIK[2]), aŭ alian institucion.

Kaj li ne laciĝas.

Ja li estas fera, bolŝevista avĉjo.

Elrusigis *J. Avrunin (1122).*

# Nekrologo

Post mallonga malsano mortis 6. junio

**K-do Otto Bernstein**

SAT-ano 3172 el Leipzig en aĝo de 48 jaroj. Lia seriozeco kaj fidindeco, lia senlaca sindonemo, kun kiu li agadis por la laborista klaso, certigas al li ĉe ĉiuj kamaradoj, kiuj konis lin,

honoran memoron!

2) VCIK — Tutruslanda Centra Ekzekutiva Komitato.

# Ni ne serĉu facilajn venkojn

Enkonduko de internacia lingvo en lernejojn estas afero tre grava kaj tial ĝia atingo estas unuavice persekutata de mondlingvanoj. Sed... samtempe ĝi estas aĥila kalkano de la mondlingva movado kaj tion pruvas al ni jena fakto: antaŭ du jaroj niaj idistaj kamaradoj trumpetis enkondukon de Ido en lernejojn de Abĥazia SSR kaj jen kion ni legas nun, en 1925 jaro, en gazeto "Trudovaja Abĥazija" (Labora Abĥazio): raportante pri jara kunveno de "Abĥazia Societo de internacia lingvo Reform-Esperanto", la gazeto diras, ke "el demandoj kaj diskutoj evidentiĝis ke en lernejoj de Suĥum (ĉefurbo de Abĥazio) ĝis nun ne estas enkondukita la internacia lingvo Ido" kaj tial la ĝenerala kunveno de la societo komisiis al la nove elektita komitato ekklopodi duafoje por antaŭ Popola Komisario de Klerigado pri instruado de Ido en lernejoj.

La kaŭzoj? Eĉ la malgranda Abĥazio verŝajne havas pli multe da lernejoj, ol la Abĥazia Societo de "Reform-Esperanto" havas da membroj, kaj ja ne ĉiuj membroj kapablas fariĝi instruistoj de la lingvo.

Jen kial ni devas esti tre atentaj por ne trafi en la situacion, en kiun trafis niaj idistaj kamaradoj, kiuj perdis tre multajn fortojn por pruvi al ni per diversaj dokumentoj enkondukon de Ido en abĥaziajn lernejojn kaj kiuj ne povis kaŝi la veron antaŭ la gazeta raportisto.

Pli saĝe agas niaj ukrainiaj kamaradoj esperantistaj: anstataŭ fanfaroni pri permeso instrui Esperanton en ukrainiaj lernejoj, ili sin dediĉis por prepari instruistojn kaj instruilojn de la lingvo; en Odessa ili aranĝis kursojn de la lingvo speciale por instruistoj kaj en Ĥarkov ili sukcesis en siaj klopodoj antaŭ Ukrainia Ŝtata Eldonejo, kiu nun aperigas en granda eldonkvanto lernolibron de Esperanto.

Jen tiamaniere, per komunaj fortoj, ni preparu la vojon al oficiala akcepto de mondlingvo, sed ne per nuraj rezolucioj kaj favoraj decidoj, ĉar en la reala vivo valora estas nur tio, kio krom teorio havas ankaŭ la ĉefan argumenton — la praktikan aplikeblon! *1516.*

# KRONIKO

**Ĉekoslovakio.**

*Gablonz a. N.* La ĉi-tiea lab. esp. grupo partoprenis oficiale je la granda komunista junulartago en Friedland pentekoste ĉ. j. La grupo kunportis la novan ruĝan standardon kun verda stelo kaj kantis dum la demonstracio esp. batal-kantojn, kio multe efikis kaj vekis intereson. Sur la festplaco kelkaj gekamaradoj disdonis la novan esp.-flugfolion de SAT (skribite germanlinge).

Jam en la pasinta martsoleno la grupo plenigis du program-punktojn per esp. kantoj (esp. himno kun nova teksto, kaj ruĝgardista marŝo). K-do Bauer parolis kelkajn vortojn pri la valoro de esperanto por la laboristoj. Rezulto: 12 subtenantaj membroj.

**Germanio.**

*Leipzig.* Ĉi tie okazis dum pentekostaj tagoj konferenco de la plivastigata estraro de LEA (Lab. Esp. Asocio por germanlingvaj regionoj). Ĉeestis krom la estraro 12 distriktestroj, resp. reprezentantoj de diversaj distriktoj kaj multaj gastoj. Post la raportoj de l'prezidanto, sekretario-kasisto, redaktoro kaj presserva gvidanto k-do *Wendt*-Leipzig parolis pri la ŝancoj de Esp. ĉe la Frankfurta Olimpiado; k-do *Bässler* pri la lernlibra demando, en kiu oni akceptis post longa debato proponon de k-do *Sproeck*-Berlin, dum aŭtuno eksperimenti en la instruado laŭ la rekta metodo; k-do *Deubler*-München pri naciaj kaj internaciaj esp-organizajoj. Li akcentis la *nedisigeblecon de per- kaj poresperanta laboro* kaj la necesecon trovi unuecan bazon, sur kiu oni povus unuigi la nacian kaj internacian lab. esp. movadon. En kiu formo tiu kuniĝo okazu, ne estis klare videble el la referato, tamen la solvo imagata celas en la direkto al grava ŝanĝo en la *statuto de SAT.* Bonvenigita kaj akceptita unuvoĉe estis la finpropono, ke LEA kunvoku la estrarojn de ĉiuj landaj lab. asocioj dum aŭgusto al Wien, por komune kun SAT interkonsiliĝi pri unuigo de la nacia kaj internacia movadoj. Same oni bonvenigis kaj akceptis la aliĝproponon de ALLE (Aŭstria Lab. Ligo Esp.) al LEA. —

En la kunveno de la SAT-anaro de Leipzig, okazinta la 3. 6., jena decidpropono estis unuvoĉe akceptita: *"La individuaj SAT-anoj de urbo aŭ vilaĝo kuniĝu kiel SAT-rondo, por komune vigligi la movadon en la koncerna loko."*

**Nederlando.**

W. Oni decidis dum la pentekosta kongreso de la Ned. Lab. Federacio Esp. per 7—8 voĉoj klopodi fondi Internacion neŭtralan. Satanoj de Holando fervore laboros por gajni membrojn kaj legantojn por SAT-movado. *Aŭskultemulo.*

**Sovet-Unio.**

*Rtiŝĉevo.* Tre sukcese korespondas loka pionirjunulara grupo kun eksterl. junulaj grupoj, same junular-komunista asocio. Al tiu esp. korespondo tre simpatias partia komitato. Nun grupo de lab. korespondantoj ĉe fervojista klubo en nomo de Lenin organizis kolektivan korespondadon kun eksterl. samprofesianoj. Tutan korespondadon gvidas k-do Ĉerniŝkov. Pri SAT kaj Esp. oni skribas en la kluba mura gazeto, kie ekzistas speciala fako por esp-ismo. *2769.*

**Kongresvojaĝo al Wien**

Nia vojo kondukas nin en tiu ĉi jaro al Vieno por partopreni la V-an SAT-kongreson. Certe multaj k-doj deziras renkontiĝi reciproke jam dumvoje. Se jes, uzu la okazon! respondu la inviton! De Passau, bavara limurbeto apud la Danubo, veturas ŝipoj al Vieno. Kiu ne preferus la ripozigan kaj refreŝigan ŝipveturadon anstataŭ fervojan? Sekve: Kelkaj k-doj jam interkonsentis renkontiĝi en Passau kaj uzi la ŝipon forveturontan la 10. aŭgusto matene. Tiu, kiu devos restadi dumnokte en Passau, skribu al k-do Haas Georg, *Passau,* Auerberg n-o 7, Bav. Sabate vespere 9. aŭgusto ni intencas aranĝi kunvenon propagandan kaj interkonatiĝan.

Surŝipe al Vieno, al la Kvina!

*Konrad Deubler,* München, Arcisstr. 48 II.

# Sekretoj de la Belgrad-a Kamariljo

3] (Fino)

Kvankam Pasiĉ estas ege kompromitita per ĉi-afero, tamen li sciis ŝajnige lavi siajn manojn (elturniĝi); bridi la reĝon kaj pere de li la aliajn kaj esti ĉiam la unua diktatoro en la ŝtato SHS.

Pro tio la reĝo klopodis sin liberigi de Pasiĉ, ĉar eĉ al li li malruĝigas la lipojn. Antaŭ nelonge ili grupiĝis: Tikiuj estis pli eksponitaj en salonika proceso, kiel Petar Zivkoviĉ, Mihajlo Rankoviĉ kaj Ljuba Jovanoviĉ, kun la reĝo, la malpli eksponitaj, generaloj Josip Kostiĉ, Mirko Miroslavljeviĉ, Uzun Mirkoviĉ ktp. kun Pasiĉ. Ĝi estas fakto kaj ĉi-fakto elvokis kunpuŝiĝon inter Pasiĉ-Aleksandar. La kunpuŝiĝo sufiĉe efikis por kaŭzi la registarfalon de la opozicia bloko, kiun prezidis Ljuba Davidoviĉ.

La reĝo pro memsekurigo kontraŭ Pasiĉ klopodis en la pligrandigita Davidoviĉ-kabineto, ennestigi siajn intimajn salonikprocesajn amikojn, kiuj estus okupintaj en la ministerio la plej gravajn postenojn. Sed, ĉar la ĉefroluloj de la radikala partio forlasis Jovanoviĉ-on, la reĝo malsukcesis, kaj estis devigita transdoni la registaron al Ljuba Davidoviĉ.

La Davidoviĉ-bloko sin montris tro neforta kaj meditema por kontraŭstari la reakcian blokon, kiu formiĝis jam komence de salonika proceso. Ĝia programo: Batalo kontraŭ la korupcio; interkonsento kun Kroatoj kaj Slovenoj. Ĝi klopodis efektivigi laŭ parlamenta vojo, sed ne elekstere, renversi la monarkion kaj dispeli la reakcian blokon, kiu en salonika afero enradikiĝis.

Kaj kvankam la registaro Davidoviĉ havis plimulton kaj kvankam ĝi havis ĉe si larĝajn popolamasojn, kolerantaj kaj malkontentaj kontraŭ la reakcia bloko, kaj sciis detale pri la salonika proceso, tamen ĝi devis fali. Ĝi devis fali pro tio, ĉar ĝia malkuraĝo ne povis elteni la batalon kun la tri faktoroj el salonika proceso: kun perfidado kaj spirituleco de la reĝo, kun ŝajnmildeco de la blankaj generaloj kaj kun subpremado de reorganizitaj estroj de la radikala partio Pasiĉ, Ljuba Jovanoviĉ.

Pro la malkuraĝeco de la bloko-registaro facile estis al la tri faktoroj, prepari ŝtatatakon kaj per tio faligi registaron Davidoviĉ.

Denove regadas hegemonio de la serba burĝaro kaj serba militarismo, mortiga kaj rabista registaro kiun rege prezidas: suvereno, "Blanka Mano" kaj ilia radikala partio.

Ĉi-atako devus esti la lasta leciono por ĉiuj subpremitaj nacioj kaj ekspluatataj amasoj en Jugoslavio, ke ili la tutan agadon, propagandon kaj organizaĵojn centraligu, ne por la balotoj, kiuj vidigis, ke ili ne povas renversi la nunan reĝimon, sed por preparo de armita ribelo de la subpremataj, ekspluatataj kaj trompataj popolamasoj kontraŭ la monarkio kaj ĝia korupta reĝimo, por pure kamparana-laborista registaro, por sia emancipo kaj ellaboro de Balkana Respublika Federacio. *Poro.*

# DISKUTEJO

## Esperanto en danĝero

Estinte ĝis nun ekster tiuj diskutantaj pri la maniero reformi aŭ "simpligi" Esp-on, mi hodiaŭ enviciĝas ilin por plenumi mian devon ilustri la danĝerecon de tia celado.

En la lasta tempo multaj k-doj prezentis ideojn pri plifaciligo de Esp-o, sed ĉiuj traktas la aferon de la tute erara vidpunkto, ke Esp-o estas lingvo kreita ekskluzive por aplikado de l' proletaro. Tute ne! En ĉiuj rondoj ni trovas adeptojn de Esp o kaj tio estas ĝojiga fakto, ĉar ju pli granda estas la Esp-istaro, despli certigata estas ĝia ekzistado kaj ni profitas per tio ke la plej grava ilo por la internacia batalo pli firma estas en niaj manoj. Reformi Esperanton do nur povas esti tasko de ĉiuj adeptoj, aliel oni estigus apartan lingvan movadon malakcelantan la tutan mondlingvan aferon.

Ĉiu nacia lingvo estas aplikata de diversaj elementoj de l' koncerna nacio kaj neniu rajtas arbitre ŝanĝi ion. Tamen la lingvoj evoluas, kvankam nur malrapide. Tia malrapida evoluo garantias la estiĝon de efektive valoraj plibonigoj. Ĉar ni rigardas Esp-on kvazaŭ naturan lingvon, ni ankaŭ devas konformigi ĝin al tiaj leĝoj.

La k-doj, verkintaj la artikolon en n-o 34 de "S-ulo" sub "Diskutejo", tre malmulte pravigas sian vidpunkton. Estas vere nur persona sento difini, ĉu la formoj *ante*, *kontre*, *balde* ktp. estas pli belsonaj ol la nunaj. Kaj pledi por ili tial, ke ili estas pli mallongaj, fakte estas senprudenta, ĉar Esp-o ne estas stenografio. La aliaj formoj difero, konfero, komito ktp. pli evidentigas la artefaritecon de Esp-o. La nunaj formoj estas pli internaciaj, eĉ tiagrade, ke ne-esp-isto facile povas traduki ilin. Koncerne la prezentatajn formojn tia ebleco ne ekzistas.

Konigi al lernantoj novajn, neoficialajn lingvaĵojn estas laŭ mia sperto taktike malĝusta. La instruatoj konfuziĝas kaj mi devis aŭdi de kelkaj dubojn pri la ekzistpovo de Esp o se oni daŭre flikadas je ĝi, kiam ĝi estas ankoraŭ en la stato de evoluo. Krome estas tute logike, ke la lernado de duoblaj formoj estas pli peniga.

De jardekoj Esp o estas aplikata nunaforme kaj neniam montriĝis la neceseco de simpligo kiel la proponata. Tiaj celadoj estas la latenta[1]) intenco de ido-igo de Esp-o. K-doj, helpu ĉiuj ke la iniciatoroj fiasku! Zorgu pri tio, ke Esp-o evoluu normale kaj laŭfundamente kaj antaŭ ĉio laŭ *montriĝanta* neceseco! Sed kontraŭ ĉio alia tuj organizu la batalon. Diskutu la problemon en viaj kunvenoj kaj prezentu vian opinion al nia Va en Wien. Vivu Esperanto!

*SAT-ano E. M. (1072), Dresden.*

## Kio interesas nin plej multe?

Niaj organoj "S-ulo" kaj "Senn. Revuo" kelkfoje instigis nin al kritiko kaj deziresprimoj rilate ilian enhavon.

Laŭ mia opinio, se ni volas kritiki kaj precipe deziron esprimi rilate la enhavon de niaj organoj, ni devas esti konsciaj pri nia celo. Kian celon ni havas?

Ni volas estigi la socian ordon de la laborantoj. Do plej multe interesas nin tio, kio helpas nin al nia celo.

Dum la hungara komuno ofte okazis al mi, ke mi havis demandojn pri detalajoj rilate la aktualajn aferojn. Mi ricevis ĉiam respondon, ke ni ne havas tempon por la detalajoj, ĉefe estas necese kompreni la esencon de la socialismo, kaj la konvena ago poste sekvos el si mem. Post la unua aŭskulto la respondo estas konvinka. Sed la spertoj montris al mi, ke la situacio ne ĉiun direktas al konvena aŭ eĉ al harmonia ago.

Do ni devas organiziĝi, t. e. ĉiu el ni devas koni sian lokon en la nova socio, kaj ĉiu devas scii, kion li volas kaj kiel realigi tion. Do ni devas klopodi pri sistemeca konatiĝo kaj pri unueco. Ni devas havi ordigitaj niajn ekkonojn, ke ni povu regule pensi.

Ĉu ekzistas scienco, kiu okupiĝas pri tiuĉi temo?

Jes, la sociologio.

La sociologio analizas la fenomenojn de la socia vivo. Montras al ni tiujn risortojn kiuj havas influon sur unuojn agi en la amaso kaj la agojn de la amasoj. Ĉu ni povas ion sukcese aranĝi sen tiuj ĉi konoj?

Do min interesus legi almenaŭ bonan skizon pri sociologio.

Plej interesa parto de la sociologio estas por ni la laborula demando aŭ la socialismo.

Mi pensas realigebla mian deziron en kadro de "Sennacieca Revuo" per artikoloj pri "Sociologio", 'Historio de socialismo", pri niaj eminentuloj kune kun la konatigo pri iliaj verkoj, kaj fine povus aperi specialaj kajeroj nur pri diversaj verkoj kiel "Kapitalo" (de Marx), "La ino kaj la socialismo" ktp.[1]). En "S-ulo" ni povus kritiki kaj diskuti pri la aktualaj temoj.

Kamaradoj! Ĉu vi konsentas?

*SAT-ano 1934.*

1) kaŝita, interna. — Red.

1) Tiajn specialnumerojn jam nun eldonis kaj estonte eldonos redakcio de S.R. — Red.

# KORESPONDADO

## TARIFO

**Korespondado: Unu enpreso:** Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

*MALLONGIGOJ:* L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* Pl = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.ajo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

**Francio.**

— K-do *Jules Lacas*, 11, rue de la Bienfaisance, *Nîmes* (Gard) dez. koresp. kaj interŝ. L, PK, Pl, k. ĉ. l.

**Germanio**

— K-doj de la Esp. grupo "Espero" dez. koresp. pri div. temoj k. ĉ. l. Adresu al la grupestro: K-do *Hugo Köthe*, Probsteistr. 8, *Teuchern* (Bez. Halle a. S.)

— ESPERANTISTA LABORISTO, 1. jaro (1920) n-o 1—11 (Dec. 20) aĉetas 1810 *Robert E. Bitzer, München*, (Germ.) Hesseloher Strasse 11/2.

**Litovio**

— **Gek-doj ĉiulandaj!** Sendu statistikajn sciindaĵojn pri politika stato (partioj, organizaĵoj, parlamentoj ktp.) vialandaj virinoj. Kiu ne scias esp. skribu germane, ruse aŭ france. Sendu tialingvajn pri tiu ĉi temo ĵurnalojn. Adr.; K-do *J. Dagys, D.*, Gimnazio, *Birzai.*

**Sovet-Unio**

— **Studentaro de l' tuta Mondo!** Skribu al adreso: K-do *Dim. Snejko*, Poŝtkesto, 33, *Minsk*, (Blankrusio) pri via vivo, situacio ktp. Bonajn k. interesajn let. mi uzos por studenta ĵurnalo "Ruĝa Standardo". Resp. garantias. Interŝ. stud. gaz. k. ĵurnalojn. Ĉu vi aŭskultas, studentaro?

— K.do *Viktoro Linev*. Do vostrebovanija, *Baku*, pri politiko, interŝ. PK, Pl, papermonon.

— K-do *Birjakov* Evgenij, Pavloviĉ, Furŝtadskaja, ul. 16, kv. 6, *Leningrad*, dez. serioz. koresp-adon pri organizo de kancelaria laboro en fervojaj oficejoj k. ĉ. l.

— "Grupo de leningradaj geesp.-fervojistoj dez. serioz. korespondadon pri vivkondiĉoj de lab. en a. landoj. Ĉiam resp. Adr.: *H. Frank*, 3a Sovetskaja, 21, kv 25, *Leningrad.*

— K-do *Josefo Baranovski*, Poŝtkesto, 33, *Minsk*, pri div. temoj k. ĉ. l. studentoj k. ekstereŭropanaj fraŭlinoj.

— K-do *Vladimir Kazakeviĉ*, *Gorodisĉhĉe*, Kieva gub. Gorodiŝĉenskij Saĥarnyj zavod (Ukraino) pri sukera industrio (ellaboro de sukero, situacio de sukera industrio ktp.) k. ĉ. l.

— Volas korespondi kun tuta mondo du studantoj *Saĥarov* kaj *Saulskij* — Sovetunio, *Irkutsk*, Universitato.

# RECENZEJO

## Gazetoj

**Represis art. el S-ulo:** *A. Vilag*, Targu-Mureŝ, 23. 5. Bono k Malbono el Britio (S. 27), 27. 5., Paŝo al solidareco intern. (S. 31); *Le Journal du Peuple*, Paris, 23. 5., Perspektivoj postmondm. (S. 30).

**Enpresis div. art.:** *Daily Herald*, London, 30. 5., 1. 6., artik. pri kaj *en* Esp., ankaŭ i. a. pri SAT k. la V-a kongr.; *Industrial Solidarity*, Chicago, 13. 5., malgr. notoj el la SAT-movado; *Die Weisse Fahne* (novspirita organo), Pfullingen, (Württ.), entenas longan prop. artikolon por Esp.

## Libroj.

**И. Изгур.** Организация международной солидарности. **Международный язык.** На службе пролетариату. **I. Izgur. Organizo de internacia solidareco. La lingvo internacia je la servo de l' proletaro.** Moskvo 1925, Unuiĝita eldonejo "La Nova Epoko" kaj C. K. SEU. Formato 23×15 cm. 36 pĝ. Eldonkvanto 5100 ekz. Prezo 20 kop.

Kresko de proleta esperanta movado en Sovetio instigis niajn Moskvajn k-dojn unuiĝi siajn fortojn por grandkvanta eldonado de propagandaj broŝuroj. La recenzata broŝuro prezentas do la unuan el la serio — ruslingvan verketon de nia k-do Izgur. Popularforme ĝi rakontas pri esenco de mondlingva movado, pri ĝia historio, kaj detale priskribas praktikan laboron kaj ideologion de SAT. Ĉiu linio de la verko spiras per poeziema entuziasmo, propra al k-do Izgur, kiu ja estas konata kiel proleta poeto en Soveta Ukrainio. La broŝuro estas prezentita en modesta, sed plaĉa aranĝo; sur la lastaj du kovrilpaĝoj en trafa formo estas donitaj ĉiuj necesaj informoj, kie kaj kiamaniere interesatoj povas akiri lernolibrojn de Esperanto, aliĝi al lokaj esp. organizajoj kaj al SAT, aboni la revuojn de SAT ktp.

La broŝuro estas rekomendinda al ĉiuj sovetiaj propagandistoj de Esp.o, kiuj zorgu ne nur havigi la broŝuron por si mem, sed precipe aranĝi ĝian vendadon en siaurba librejo.

*G. P.*

**Unuigita eldonejo "La Nova Epoko" kaj CK SEU**

Ĵus aperis! Ĵus aperis!

**A. Jodko**

**Laborista klaso kaj internacia lingvo**

2-a pliarĝigita eldono de la konata ruslingva propaganda broŝuro.

Pr.: 20 kop.

Mendu ĉe librejo de C. K. Svjazj, **Moskvo**, Solanka 12, k. 326. Senpere al la eldonejo adresu nur opajn mendojn (ne malpli ol 50 ekz.)

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG